# Ateismo

Bulteno de la Atea Tutmonda Esperanto Organizo

http://www.gazetotekolanti.com/ateo/a11.pdf





**№ 11** **Decembron de 2010**

# Parolas la prezidanto

Ĉiu monato alportas novaĵojn pri la stato de la influo de la religioj, ie en la mondo. Ŝajnas ke la situacio pli kaj pli rapide evoluas, foje negative, sed evidente kreskas la kialoj de optimismo ĉi-rilate. Interalie en pluraj landoj ekĝermas la ideo disigi la religion de la ŝtato, kies du ĉefaj avantaĝoj estas, laŭ mi, kaj ĉesigi la financadon de la eklezioj pere de publika (ĉiesa) mono, kaj eksigi la religiajn doktrinojn de la lerneja medio (almenaŭ kiam la lernejo estas publika).

Bolivio estas ĉi-rilate bela ekzemplo de lando kiu faris interesan paŝon en tiun direkton, adoptante novan konstitucion laŭ demokrata procezo. Cetere, ke tiu paŝo estis farita en lando tre kredema ne estas sensignifa. Mi aldonu ke, kiel esperantistoj, ni ja povas ĝoji ke tiu sama konstitucio oficialigis multajn lingvojn de la lando. Tridek ses novaj lingvoj retroviĝas kun la hispana, je statuso de oficiala lingvo. Ĝuste tiujn du punktojn mi intencas evidentigi en la gratul-mesaĝo kiun nia asocio decidis sendi al la Prezidento de Bolivio, Evo Moralès. Mi planas efektivigi tiun sendon antaŭ la apero de ĉi tiu numero.

Alia grava evento estas nia oficiala subteno al la kreado de Internacia Asocio de la Liberpenso en 2001 en Oslo / Norvegujo. Verŝajne reprezentanto de nia asocio ĉeestos tiun gravan eventon. Por la momento, mi deziras okupiĝi pri io pli urĝa : la internacia komisiono de la Liberpenso sendis alvokon por trovi tradukantojn de diversaj dokumentoj eldonitaj ĉi-okaze. Mi supozas ke ni, kiel membroj de aparta lingva komunumo, principe nin proponu kiel tradukantojn al Esperanto. Do ĉiuj el vi kiuj sentas sin kapablaj kaj disponeblaj tiukampe, bonvolu vin anonci, nepre precizigante de kiu lingvo vi povas plenumi tradukadon al Esperanto. Mi antaŭ-dankas.

Fine, tiel montrante ekzemplon de kunefikado de ateismo kaj esperantismo, mi deziras mencii la publikigadon de la traduko el la franca lingvo de la impona “Traité d’athéologie” (“Traktato de ateologio”) verkita de Michel Onfrey, tradukita de Paul Signoret, eldonita de SAT-Amikaro. Mi vere esperas ke tiu libro same furoros en Esperantujo, kiel ĝi furoris en franclingvaj landoj.

Nia kongresa agado en Kubo estis vere sukcesa. Ĝin pli detale priskribas la venontaj paĝoj.

Momente bonan legadon de nia dek-unua numero.

*Christian Rivière*

# Administra kunveno

**Administra kunveno de ATEO okazis komence de la UK-semajno en Havano.**

Ĉeestis 14 homoj, inter kiuj kvar estraranoj de la asocio. Sen antaŭplanita tagordo, ni celis doni al la ĉeestantoj sufiĉe kompletan prezenton de nia agado.

Post kelkaj praktikaj punktoj kaj informoj :

.kotizo – 15 eŭroj jare (kun du numeroj de la bulteno). Dum la kongreso, aparta prezo por allogi membrojn el B-landoj estis proponata : 10 CUC.

.pri la revuo. Ni invitis ĉeestantojn kontribui al la revuo. Unu diris, ke ŝi ofte sentas sin sur insulo, sed ricevante la revuon ŝi ne plu sentas sin sola.

.ni menciis du ateismajn librojn, kiuj troviĝas en la libroservo de la UK, en la fako “Religioj”.

.ĉu sendi nian revuon senpage al diversaj estraranoj, aliaj revuoj kaj al bibliotekoj ? Respondo de la plimulto : preferinde jes, eĉ se escepte de nur kelkaj.

Ni prezentis notindajn elementojn pri la agado de la asocio, de membroj aŭ de kunlaborantoj :

. en 2011 en Oslo / Norvegujo, estos fondita Internacia Asocio de Liberpenso. ATEO decidas aktivi en tiu medio, kaj nia nomo jam aperas en ties listo de subtenantoj. Vic-prezidanto Dominique Simeone ĉeestos venontan jaron en Oslo.

. Christian Rivière instigas ĉeestantojn prezenti ATEOn en sialandaj asocioj ateistaj aŭ liberpensaj.

. tripaĝa artikolo pri Esperanto kaj ateismo aperis en franca revuo de liberpensuloj (La Raison). Tiun artikolon verkis Dominique Simeone.

. en Bolivio okazis disiĝo de ŝtato kaj eklezioj – francaj liberpensuloj sendis gratulmesaĝon. ATEO sendis la sian kaj en la hispana kaj en Esperanto.

. sub egido de la franca sekcio de SAT (SAT-Amikaro) estis eldonita la furora "Traktato de ateologio" verkita de Michel Onfray (elfrancigis ĝin Paul Signoret).

Al S-ro Evo Morales,

Moŝta Prezidanto de Bolivio.

Estimata s-ro Prezidanto,

Je la nomo de la Ateista Tutmonda Esperanto-Asocio, mi esprimas nian ĝojon kaj emocion pro la demokrata oficialigo de nova konstitucio en Bolivio.

Ĉar ni estas kaj ateistoj kaj esperantistoj, mi deziras substreki nian apartan aprobon pri du gravaj elementoj de tiu ĉi konstitucio, nome :

. la oficialigo de tridek ses lingvoj, aldone al la hispana lingvo. Certe, tiu decido efike kontribuos al la konservado de la lingva heredaĵo de via lando ;

. la disigo de la eklezioj kaj de la ŝtato, tiel asertante ke ĉio religia restu afero privata. Bolivio tiel estas la unua lando de Sud-Ameriko regata laŭ laikaj principoj.

Esperante ke Bolivio tiel montros la vojon al aliaj landoj de via kontinento kaj de la tuta mondo, bonvolu ricevi niajn plej sincerajn gratulojn.

Altestime,

*Christian Rivière,*

*Prezidanto de ATEO.*

# La celo de la vivo

**Jen unu el la grandaj temoj – efektive, la plej granda temo el ĉiuj – kaj tio estis ankaŭ la temo de la publika kunveno de ATEO dum la kongreso en Havano. Kial ni elektis tiun temon ? Ĉiam venas al la kunvenoj de ATEO ankaŭ neateistoj, kiuj deziras kompreni pli bone nian vivfilozofion. Niaj publikaj kunvenoj tamen ne kontentigas ilian scivolon, ĉar ili kutime estas dediĉitaj al pli mallarĝaj kaj specifaj aspektoj de la ateisma pensado. Tial ĉi-foje ni decidis klarigi ateismon al tiuj neateistoj vizitantoj, provante montri al ili, kiel ateistoj vidas la mondon.**

La celo de la vivo estas tre persona afero, kaj malsamaj homoj havas pri ĝi malsamajn opiniojn. Tial ne eblas diri, ke dum la kunveno (kie ĉeestis pli ol 60 kongresanoj) ni atingis unu komunan konkludon ; tutsimple ni aŭdis personajn kaj tre variajn opiniojn de deko da homoj. Kelkaj el tiuj opinioj, ankaŭ de membroj de ATEO ne ĉeestintaj la kongreson, troviĝas en la postaj paĝoj.

Necesas aldoni, ke "La celo de la vivo" estas esprimo interpretebla dumaniere. Ĉu ni parolas pri la pri granda celo, la kialo de nia ekzisto, aŭ ĉu ni parolas pri la pli malgranda persona celo de unuopa homo ? Necesas diskuti tiujn du interpretojn aparte.

Unue, pri la kialo de nia ekzisto. La plejmulto da sciencistoj kaj ankaŭ ateistoj nuntempe opinias, ke la vivo ekestis pro bonŝanca kombino de kondiĉoj, ekzemple ĉar nia planedo troviĝas je precize la ĝusta distanco de nia suno por havi taŭgan temperaturon, pro la ekzisto de akvo sur la Tero ktp. Ankaŭ la ekesto de homoj estis la rezulto de jarmilionoj da evoluado kombine kun la ĝustaj fizikaj kondiĉoj. Homoj ne evoluis sekve de iu supera plano, sed nur pro bonŝanca hazardo – bonŝanca almenaŭ por ni mem, kvankam verŝajne ne por la aliaj vivantaj estaĵoj sur nia terglobo.

Religiuloj foje argumentas, ke se la vivo ekestis hazarde, tio signifas, ke ni homoj estas ĉi tie sen iu pli granda celo. Mi konsentas pri tio, sed male kiel ili mi ne vidas tion kiel problemon. Kaj cetere, eĉ se ne plaĉas al ni pensi, ke la homoj ekaperis senmotive, nia ŝato aŭ malŝato ne influas la situacion. Mi volus respondi al tiuj religiuloj jene : Kiun celon, laŭ vi, Dio havas por ni ? Se ni estas ĉi tie nur por plenumi lian celon, kiel tio igus nin pli feliĉaj ? Ĉu ni devus esti kontentaj nur plenumi lian volon, eĉ ne sciante, el kio tiu volo konsistas ? Se li estas tiel granda kaj potenca, kial li entute bezonas nin ?

Due, mi volas paroli pri la personaj celoj de unuopuloj. Multaj homoj, ĉu ateistoj, ĉu religiuloj, sentas la bezonon doni ian signifon al sia vivo. Sed eĉ inter religiuloj, malmultaj homoj elektas dediĉi sian tutan vivon al plenumo de la Dia volo. La plejmulto da homoj donas signifon al sia vivo per iu pli malgranda kaj persona ambicio, ekzemple trovi vivpartneron, sukcesi en sia kariero, volontuli en bonfara organizaĵo, realigi ian talenton, aŭ simile. Tiu serĉado de persona celo plejofte estas sama por ateistoj kiel por religiuloj.

En la sekvaj paragrafoj ni aperigas liston de celoj, kiun ni

laŭtlegis dum la kongreso en Havano por stimuli diskutadon. Ni nomis ĝin "La celoj de la vivo – laŭ ateistoj". Legante tiun liston, vi rimarkos, ke tiuj ne estas aparte ateismaj celoj, sed komunaj celoj, kiujn havas la plejmulto da homoj.

*Anna Lowenstein*

## La celo de la vivo laŭ ateistoj

### La celo de mia vivo estas...

... lukti por pli egala kaj justa socio.

... naski kaj eduki miajn infanojn.

...enkonduki Esperanton kiel internacian lingvon.

...transdoni la Teron en bona ordo al niaj posteuloj.

... Kiu celo? Kial ni bezonas celon?

... helpi aliajn ĝui pli kontentigan vivon.

...krei verkon, kiu travivos post mia morto.

... solvi la problemon de malsato en la mondo.

... ĝui la pasantan momenton kaj flari la florojn.

... disvolvi kreemon, utopiemon, fantaziemon.

... imagi la mondon tia kia ĝi ne estas.

... esti kapabla demandi "Kial?" anstataŭ "Kial ne?"

La debato proponata kadre de nia kunveno en la Universala Kongreso en la Havano, efektive vekis intereson, kvankam pluraj, prave aŭ ne, taksis ĝin kvazaŭ elpensita sub religia influo. Nu, mi plu opinias ke ĝi tamen estis sukcesa, almenaŭ ĝi estis bona preteksto al debato, al interŝanĝo de vidpunktoj. Ni cetere ne forgesu ke se la vortoj « celo » kaj « vivo » estas sufiĉe bone difinitaj, mi dubas ke la vorto « ateisto » estas egale komprenata laŭ la landoj (same laŭ la epokoj). Bona okazo do por tion pli precize percepti.
Pluraj homoj ne intervenis en la debato en tiu okazo, ĉu pro manko de tempo, ĉu pro timemo paroli antaŭ publiko, ĉu pro ne partopreno al la kongreso aŭ nur pro neadekvata horo de la kunveno. Mi supozas ke iuj preferas pripensi kaj skribe respondi poste, kaj mi mem troviĝas en tiu kroma kategorio. Tial, fine de la somero ni petis niajn membrojn kaj la ĉeestintojn de nia kongresa kunveno, ke ili sendu kontribuon pri la demanda temo. Jen ĉiposte la rezulto de nia alvoko. Ni sincere dankas ĉiujn kontribuintojn.

*C.Rivière*

Pri antaŭa komento, en kiu oni diris ke "la celo de la vivo estas vivi", tio ne veras, ĉar ĉiuj homoj vivas, sed ne ĉiuj feliĉe. Ekzemple pri la personoj kiuj malsatas, aŭ pri la malriĉuloj : tia vivo ne estas celo.

*Victor Iván Sombra Argüelles,*
*de Meksiko.*

Mi dankas vin pro via ĉi-suba retaĵo.
Kaj mi konfirmas la intereson en mi vekitan de la interŝanĝo de ideoj, kiu

okazis dum via kunsido pri ATEO.
Certe oni ne povas malaprobi la celojn precizigitajn en via kunmetita afiŝo. Sed tio ne sufiĉas por fari min aktiva membro de via movado. Kaj mi ne havas elementojn por redakti iun artikolon pri via agado aŭ via idearo.
Cetere mi skribas ĉi-sube tekston, kiun mi redaktis kadre de raporto pri la kongreso :
"Mi aŭskultis, ne intervenante, la du prelegojn : unuflanke de la Spiritisma Asocio Ev. Lorenz ; aliflanke de ATEO por ateistoj. Ambaŭ elmontris elokvente la similecon de siaj ideoj, idealoj kaj celoj kun tiuj de Esperanto kaj de la interna ideo ... Kial ne ? Mi ne havis argumentojn por interveni ; kaj mi plu restas pasiva agnostikulo ... Kaj internideulo".
Ricevu miajn elkorajn salutojn.

*Claude Longue-Epée (Francujo)*

## La celo de la vivo laŭ ateistoj

Kiam oni ne studis filozofion, malfacilas vortigi, ĉar la vivo trapasas plurajn periodojn, dum kiuj la interes-kampoj ŝanĝiĝas. « Naski kaj eduki infanojn » koncernas la « kredantojn ». Tio ne estas la celo de novaj geedzoj, infanoj naskiĝas plej ofte pro hazardo / akcidento !!

Mia unua kontakto kun Esperanto okazis en 1936, dekses-jaraĝa. Baldaŭ naŭdek-unu-jaraĝa, mi « okupiĝas » ĉiutage pri Esperanto, sed NE estas la « celo » de la vivo !

La vorto « celo » estas, por averaĝaj individuoj (la popolo de la malsupro) ne aplikebla, ĉar rezervita al intelektuloj.

Estas mia opinio, kiu eble ne respondas al tio kion vi atendis.

*WOUTERS Maurice, R des Cafrancs 10,*
*5520 ONHAYE, Belgujo*
*Eo.wm.5520@skynet.be*
*La 7an de septembro 2010*

## Ĉu ateisto aŭ agnostikulo ?

Grava diferenco : konscia ateisto, se li posedas minimumon da inteligenteco, neniam konsideras, ke li (kaj nur li) posedas la veron. Logika kredanto, se li estas vera kredanto, kaj do posedas la fidon, konsideras ke nur li posedas la veron.
Kompreneble, ĉiu kredanto respondos ke ofte li dubas : sed, se li dubas, tio signifas ke li ĉesas konsideri, ke li posedas la veron, do tiam, li ne plu estas kredanto.
Tio klare montras, ke ĉiu diskuto kun kredanto estas vana, ĉar nur li certas posedi la veron.
Ateisto, kiu certas, ke Dio ne ekzistas, estas por mi alia speco de kredanto kaj pro tio, mi preferas konsideri min, kiel agnostikulo.
Estus interese fari konsulton inter la abonantoj de « Ateo » por scii, kiom da ili konsideras sin, kiel ateisto, kaj kiom kiel agnostikulo, kaj havi la vidpunkton de ambaŭ.

*Jean Marin (Francujo)*

Duobla, kaj tiel ne multe diferenciĝas de la celo de ĉiuj homoj : feliĉo por si mem, feliĉo por ĉiuj homoj. Nur la rimedoj diferenciĝas : la ateistoj kalkulas nur pri si mem por atingi tiun celon, la kredantoj

kalkulas ankaŭ pri si mem sed ankaŭ kaj, bedaŭrinde, tro ofte, ĉefe (kelkafoje eĉ nur), pri Dio.

Alia ĉefa diferenco estas ke, por kredanto, pli gravas plaĉi al Dio ol savi la homaron. Kristana parabolo pruvas tion nediskuteble : la parabolo de Abrahamo, preta mortigi sian filon por obei al Dio.

Kaj malgraŭ kelkaj belaj frazoj (« amu unu la aliajn », «ne faru al aliulo kion vi ne volus ke oni faru al vi »), la ĉefa celo de Dio estas ke oni amu lin kaj obeu al li. La rifuzo de la uzo de kondomo, por plaĉi al Dio, eĉ se tio kondukas al la sufero kaj morto de milionoj da viroj, virinoj, senkulpaj infanoj, tion pruvas.

Eĉ kredantoj famaj pro sia profunda amo al la plej malfeliĉaj homoj ne estas escepto konsidere tion. « Patrino Terezo », kiun ĉiuj admiras, ne estas escepto kaj ĉiam kondamnis la uzon de kondomoj.

***Jean Marin (Francujo)***
***jmarin_93@hotmail.com***

Jen miaj ideoj pri la temo :
1. Plej ĝenerale, la celo de la vivo estas vivi. La vivo, tra la vivantoj, deziregas daŭrigi sin, multobligi sin, generi venontajn generaciojn, disvastigi la vivregionon, kaj multnombri je gamo de diversaj ecoj.
2. La difino de la vivo estas manĝi (metabolismi) kaj seksumi. Ĉiuj kiuj faradas tion estas vivanta, kaj inverse. Pro tiu naturo de la vivo, la vivantoj estadas ĉiam en konkurego kaj por akiri la vivrimedojn (manĝaĵoj) kaj por pligrandigi la ŝancoj de sia generigo (seksumo).
3. La vivantoj bataladas, luktas kaj kontraŭ la malfavoroj de la naturo kaj unuj kontraŭ la aliaj por pluvivi.
4. Ni homoj, kiel eble la plej altgrade konsciaj bestoj povas, kaj do rajtas, leviĝi de la bazaj vivklopodoj kaj eĉ agi kontraŭ ili. Sekve ni elkovras niajn proprajn vivocelojn.
5. Pro la naturo de la vivo mem, la deziroj kaj sekve la konstanta luktado satigadi ilin, la vivo estas malfacile travivebla kaj por la plejmulto malfeliĉa. Ju pli konsciaj la vivantoj des pli imponas la vivo.
6. Niaj celoj kiel homoj estas laŭgradaj. 6a. Sekvi la bazajn celojn de la vivo. 6b. Efektivigi nian potencialojn, korpajn kaj mensajn. 6c. Strebi esti feliĉaj.
7. Por vivfeliĉi ni devus havi kaj liberon kaj la rimedojn por plenumadi la vivocelojn ekde la bazaj ĝis la plej malbazaj t.n. spiritaj.
8. Libero praktike signifas : moviĝo, parolo, asociiĝo, entrepreno, strebo por atingi memfeliĉon. Sed alifranke ju pli da libero ni havas des pli pezas la decidoj, kiujn ni devas fari, dilemigas nin. Memoru ke male al elekto, decido signifas forigo de la aliaj eblecoj kaj foje estas neinversigebla.

***Shai Mor***

## Ateisma konkludo pri la signifo de mia vivo.

Tra la tuta naturo oni vidas, ke la plej grava celo de ĉiu vivanta estaĵo estas reprodukti sin. Birdoj dediĉas ĉiun someron al serĉado de partnero, konstruado de nesto, kaj prizorgado de siaj idoj. Salmonoj naĝas milojn da kilometroj kontraŭflue por atingi la

lagon, kie ili seksumos kaj demetos siajn ovojn. Imperiaj pingvenoj staras senmove dum monatoj en la polusa neĝo por protekti sian ovon de la glacio. Kelkaj virbestetoj, ekzemple mantidoj kaj iuj araneoj, eĉ riskas la morton por seksumi kun partnerino, kiu tuj post la kuniĝo voras sian ne plu bezonatan aminton ; kiam la viro transdonis siajn spermojn, lia vivocelo estas plenumita.

Ni homoj ne estas malsamaj de la aliaj bestoj. Estas vere, ke ni serĉas por ni mem pli “altajn” celojn (vidu ekzemple la liston en la paĝo XX), sed la plej baza bezono de preskaŭ ĉiuj estas sama kiel por ranoj, aproj aŭ muŝoj : trovi partneron kaj produkti idojn. Tio estas la ĉefa temo de nia tuta literaturo kaj filmarto : serĉado kaj trovado de amo. Kiam dekkelkjarulo sopiras je amo, kompreneble ŝi/li ne pensas pri nasko, eĉ provas eviti tion, sed tiu profunda deziro ami kaj esti amata fakte havas biologian bazon. Ĝi estas natura bezono, pli aŭ malpli forte enprogramita, kiu aperas proksimume samtempe kun la seksa maturiĝo kaj pelas nin serĉi partneron.

Kelkaj homoj, precipe viroj, tute ne interesiĝas pri amo, sed ege deziras kiel eble plej vaste dissemi siajn spermojn. Ankaŭ tiuj homoj plenumas sian biologian destinon. Nuntempe ni inventis manierojn trompi la naturon kaj seksumi sen gravedigo, sed la impulso estas la sama kiel tiu, kiu tiras ĉiujn virhundojn el tuta regiono por atingi seksopretan inon.

Mi do opinias, ke la ĉefa vivocelo de la plejmulto da homoj estas trovi partneron kaj naski familion. Bonŝance tiuj agadoj kutime ne malhelpas nin havi ankaŭ aliajn interesojn, ekzemple lerni Esperanton aŭ volontuli en iu bonfara organizaĵo. Sed por la plejmulto el ni tiuj aliaj okupoj estas duarangaj kompare kun kreado kaj prizorgado de la propra familio.

Mi pardonpetas, ke mia konkludo verŝajne agacas tiujn legantojn, kiuj aŭ ne elektas aŭ ne povas pro diversaj kialoj trovi partneron aŭ naski infanojn. Kompreneble ni homoj, estante multe pli inteligentaj ol la aliaj bestoj, trovis sennombrajn manierojn por doni signifon al nia vivo krom per produktado de infanoj. Krome, niaj vivoj en la moderna mondo normale daŭras tiel longe, ke naskado kaj prizorgado de infanoj okupas relative mallongan periodon. Tial ankaŭ tiuj homoj, por kiuj kreskigo de familio estas la plej grava vivocelo, bezonas aliajn interesojn por doni signifon al la vivo, kiam la infanoj ne plu bezonas ilin.

***Anna Löwenstein (Italujo)***

La temo diskutata dum la kongreso en Havano vekis intereson. Kaj ĉiufoje, oni konstatas ke la respondoj povas esti tre malsamaj laŭ la personoj.

Eĉ por kelkaj, la temo estis senkiala ĉar « celo en la vivo » ne havas sencon.

Tio tiklis min kaj, unue, mi ne komprenis tiun vidpunkton : laŭ mi, celo en la vivo estas bezono, speco de motoro por antaŭeniri ...

Mi bone memoris ke, kiam miaj demandoj rilate la religion, malhelpis min konservi Dion kaj liajn preceptojn kiel celon de mia vivo, mi devis trovi alian kaj tute nature, mi decidis fidi « Homon ».

Fakte ankaŭ la plejmulto de la ĉeestantoj de la kunveno, sentis tiun bezonon.

Do, mi demandis min ĉu, kiel ofte kaj senkonscie, nian vidmanieron de la mondo ne influis nia kristana aŭ religia edukado kaj ĝia aparta kaj premanta moralo kiu trudas niajn pensojn de jarcentoj.

*Martine Rivière*

Mi proponas : Evoluo de la konscio
Amikajn salutojn

*Arne Casper*
*Bryggervangen 70, 4.tv.*
*DK 2100 Kopenhago*
*Danujo*

## Kio estas la celo de la vivo ?

Vi povas funkciigi la interreton kaj starigi la demandon en iu ajn serĉ-motoro, vi falos konstante sur religiajn asociajn respondojn kaj sur multajn religiajn personojn kiuj scias pli bone ol vi la celon de la vivo, kaj kiuj provas trudi en vi siajn pens-manierojn.

Kiel mi komprenas tiun demandon ?

Mi komprenas per tiu demando : kio estas la kialo de la ekzisto de la universo kaj kial, en iu planedo de suna sistemo, aperis la vivo kaj kial iom post iom aperis la kompleksa vivo kies ni estas famaj reprezentantoj.

La judoj, la mormonoj, la evangeliistoj, la jehovah-atestantoj, la kristanoj, la katolikoj, la mahometanoj ktp... ktp... kaj precipe la gvidistoj de tiuj religioj respondas.

Ili scias ĉion kaj sin turnas al siaj Libroj por gurdi iliajn pens-manierojn : oni ne estas sur Tero por nenio. Necesas kredi je Dio. La vivo havas celon : vin savi se vi sekvas la direktivojn de la Libro.

Sed, kial la ĝenerala penso ĉiam direktiĝas al Dio ? Ĉar de la naskiĝo la penso estas gurde formatita al tio. Antaŭe la homoj ne kredis je unu Dio sed je pluraj dioj. Ĉar liaj pensoj estis tiel formatitaj.

Kial multaj infanoj kredas je Avo Frosto de la dua ĝis la sesa jaro ? Ĉar ilia penso estas formatita, ĝis kiam iu « vendas la meĉon » (t.e. ĝis kiam iu diras la veron pri la neekzisto de Avo Frosto).

Imagu ke, ĉirkaŭ vi, ĉiuj homoj certigas ke Avo Frosto ekzistas sen iu kontraŭ-diranto. Nu, vi strebos por opinii la malon. Vi diros al vi : se tiom da homoj kredas je Avo Frosto, lia ekzisto estas sendube vera.

Nu ! mi ne perdiĝu en miaj diroj ! La dioj ne ekzistas kaj Dio ankaŭ ne, kaj tial se dioj aŭ Dio ne ekzistas, neniu povas certigi ke la vivo havas celon. Escepte se mi estus mem dio. Nu, se mi estus dio, mi ne ŝvite klopodus por respondi al tiu malbone starigita demando.

Certe, ĉiuj el tiuj kiuj rakontas mensogajn malseriozaĵojn ridetigas min. Ĉar, fakte neniu dio iam al ili diris konfidencojn. Tiuj kiuj asertas tion, nomiĝas « iluminatuloj » kaj ekzistas veraj iluminatuloj : homoj kiuj kredas esti ricevantoj de la vero, tiel kiel ili vere aŭdis ĝin. Estas eĉ iu, kiu skribis : Dio ekzistas kaj mi renkontis ĝin.

Alie, mi komprenus la demandon : ĉu la vivo enhavas celon ? Se vi demandas kio estas la celo de la vivo, la demando postulas ke la vivo enhavas celon sed sen scii kian.

Do, la demando estas jam maltaŭga kaj venas sendube de iu kiu ricevis religian edukadon.

Resume, por simpligi la aferon, la vivo ne enhavas celon krom tio : reproduktiĝi, per sekskuniĝo aŭ dis-

ado (eble per aliaj metodoj : mi ne scias ĉion) provante eskapi al morto krom en esceptaj okazoj : malsanoj, maljuneco kaj malbon-vivo. Estas la celo genetika de la vivo. Pri la cetero, neniu respondo krom malveraĉaj respondoj.
Krome, kial starigi vanajn demandojn. Nu ! Mi opinias ke tio utilas por pasigi tempon. Efektive, hodiaŭ, pluvegas tiel ke oni ne deziras meti la nazon ekstere kaj tial, skribi esperante estas perfekta tempopaso sub tia aĉa ĉielo.
Mi vin diras « ĝis » kaj ne « adiaŭ ».

***ulo38***

La celo de la vivo estas tre simpla : Vivi kun kaj en amo.
Don't worry - Be happy ! (Ne maltrankviliĝu – Trankviliĝu !)

***Tara***

Mia difino de vivocelo : feliĉigi almenaŭ unu homon por forgesigi lin/ŝin la sencelecon de la vivo.
Kore salutas,

***Horst Vogt (Germanujo)***
***mailto:horst_vogt@gmx.eu***

La celo de la vivo ? Kio povas esti la celo de agaca kaj neutila insekto kiel moskito ? Eble laŭ la aliaj bestoj, la homo estas la plej malutila vivaĵo, kies celo estas detrui la tutan planedon.
La fama verkisto kaj ateisto Douglas Adams, en sia verko La gvidlibro de la intergalaksia vojaĝanto mencias la koncepton de La fina respondo pri la vivo, la universo kaj ĉio. La respondo estas 42, eble la plej taŭga kiun ni konas (en la historio, la rezulton disponigas la super-komputoro Profundaj Pensoj post kalkulado daŭranta 7,5 milionojn da jaroj).
Mi opinias ke verŝajne vivo ne havas celon. Ĝi simple ekzistas. Ni povas nur vivi, ĝui nian vivon kaj helpi aliajn ĝui siajn.

***José Luis Scanferlato (Italujo)***

La demando ne estas simpla, tamen la spertaro de mia vivo konvinkis min, ke ĉio en la universo strebas al perfekteco per daŭra evoluo. Ĉiu estaĵo klopodas dum sia vivo atingi plej altgrade dignan lokon en la kadro de sia propra specio, por venki la rivalecon koncerne similulojn kaj por kontraŭstari al malamikaj fortoj ĉu naturaj ĉu de aliaj specioj, ĉar Darwin malfermis la pordojn de la natura evoluprocezo, laŭ kio malfortuloj pereas kaj fortuloj transvivas por plibonigi la adaptiĝemon de ĉia specio. Simple dirite, precipe pri la homa specio, karakterizata per memkonscio, mi opinias, ke ĉiuj celas akiri feliĉon, tio estas kontentigi siajn korpajn kaj spiritajn bezonojn. Kompreneble la vojoj por iri estas plej malsamaj, laŭ propraj talento, inklino, edukado, mona kaj fizika potencialoj, kulturo. Kio distingas ateistojn de kredemuloj estas la tempo dediĉita por la celo, kaj ties esenco. Fakte la unuaj kontentiĝas per reala, efektiva plenumado de propraj kapabloj, en la limigita tempo de sia natura vivo. La aliaj, pli avidaj, streĉiĝas al eternaj ĝojo, plezuro, juneco, manko de malsanoj kaj doloroj, eĉ en tre agrabla kompanio.
Historie Budho kredis solvi la problemon forigante dolorojn kaj suferojn per nuligo de la propra mio, per kompato al ĉiuj estaĵoj en la universo kaj do nepra toleremo de ties diferencoj. Oni venkas morton per metempsikozo, tio estas reenkarniĝo en malsamajn estaĵojn.

Epikuro elektis vojon pli konkretan, aktualan kaj ankaŭ ekologian : kontentigi nur necesajn, naturajn bezonojn, ne la superfluajn, kiuj pli kaj pli multobliĝas senfine, kun damaĝo de personoj kaj de mediaj kondiĉoj. Jesuo, se vere li ekzistis, kiel transdirite de la romkatolika eklezio, prokrastis la solvon en fantasta transmondo, en kiu ĉiu resurektos kaj trovos agnoskon de siaj meritoj kaj punon de maljustaĵoj. Tamen la celo kaj la iloj por ĝin atingi estas tiom malproksimaj de realo, ke ĉiu sana prudentulo ne povas interkonsenti.

Laŭ mia opinio, oni povas helpi la naturan vojon al daŭra pliboniĝo de la ekzistado per pliboniĝo antaŭ ĉio de la propra fizika farto, kaj korpa kaj psika, ekspluatante la nuntempan sciencan konon, kies horizonto plivastiĝas pli kaj pli kaj kies regado donas al ni liberecon de ĉiaj malbonoj, kaj do la deziritan feliĉon.

Mia revo kuŝas sur estonteco en kiu la "homo sapiens" fariĝos ankaŭ "ethicus", libera de ĉia superstiĉo, plena kaj justa reganto de si mem kaj de la universaj leĝoj, ĉar la pasinta nesciado estos nur historia memoraĵo. La forto de malbono konsistas nur el sinsekvo de eraroj kaŭzataj de nekompleta aŭ tordita sciado. Kiam oni perfekte regos sian korpon kaj la monda komunumo respektos la individuan liberecon, tiam feliĉo dominos sen helpo de fantastaj estaĵoj aŭ transteraj mondoj.

Korajn salutojn

***Pino Lalli (Italujo)***

La vorto « celo », des pli en la esprimo « celo de la vivo por ateistoj » eble estos komprenata iom diverse. Mi ne nepre sentas la bezonon havi celon de mia vivo, kio ne signifas ke mi ĉiutage ne havas celojn ene de mia vivo. Ne gravas ĉu la vivo aperis spontanee, hazarde, kvantike, ĉu post longa procezo de selektado, ĉu de pra-eksplodo, ĉu el prakoto de nia planedo, la vivo estas fakto sufiĉe valora, impresiva, mistera, samtempe ne definitive antaŭplanita, nek de iu superaĵo nek de io ajn, kvazaŭ trako kiu malhelpus elekti sian vojon. Tial fronte al tia demando, mi volonte rekonas ke mi modeste provas interveni pozitive en mia vivo kaj en mia ĉirkaŭa medio, profitante de tiu mianivela ebleco de interveno kaj decido. Jes, ŝajne tio estas mia celo ene de mia vivo, eĉ se tio estas nur speco de dumviva sinteno.

***Christian Rivière (Francujo)***

## La celo de mia vivo

Celon, la vivo havas neniun.

Tamen, kiel Homo Sapiens, mi sentas min devigata, mi provas, mi ŝatus, indi pri tiu cerbo kiun la hazardoj de neprobabla evoluo donis al ni..., kaj kiu ebligas nin pripensi pri la vivo, pri nia ekzisto...

Do, por mi efektive estas celo : « studi, kiel se oni devus eterne vivi », mi ŝatas tiun aforismon, lernadi por pli ĝuste kompreni la universon, nian mondon, la vivon sur Tero... Kio estas pli interesega !

Ankaŭ studi cele al efikaj agadoj por interkompreniĝo, por solidareco, por plibonigo de homa vivo, por la graveco defendi la diversecon je ĉiuj niveloj ...

***Françoise Guihaumé (Francujo)***

# Agora

## *Filmo verkita de Fernando Abenamar, kun Rachel Weisz en la rolo de Hipatia*

**Agora estas filmo impertinenta kiu spite spegulas al ni nian sovaĝecon.**

Ĝi okazas en Aleksandrio, en la jaro 391a antaŭ Kristo kaj disvolvas la terurajn ribelojn kiuj eksplodis per bruligado kaj rabado de la fama biblioteko, konservejo de la tuta antikva saĝeco. Apriore, ŝajnas ke oni pasigos bonan momenton per brutala kaj buntkolora peplofilmo, kiajn oni ŝatetas. Sed ne temas pri peplofilmo, sed pri sobra kaj svarma historio-restarigo, preskaŭ pri dokumenta filmo. Krome, ve ne temas pri bonaj momentoj, sed pri esencaj momentoj kiuj konkukas al pripenso de la homa naturo, do de la nia.

La filozofo kaj astronomo Hipatia ja nin pripensigas kiam ŝi adresiĝas al siaj lernantoj, al eminentuloj de la civito, al siaj disĉiploj kaj sklavoj. Atea kaj humanisma, ŝia figuro leviĝas hieratika kun tro evidenta fragileco : la liberpenson daŭre minacas fanatikismo. Tie, en Aleksandrio, la plurdeistoj, la judoj, la kristanoj alfrontiĝas. Ĉefe tiuj lastaj, fanatikuloj bestiaj, krude dogmemaj, kri-vokas ekstermadon de la virinoj kaj de la infanoj. Ili estas la sinistraj parabolanoj, ĉe la pinto de la kristana ekstremismo.

Tiel, la juna kaj bela Hipatia starigas racion fronte al la barbareco, la humanismajn principojn al la dogmoj, la liberpenson al la prediko, la liberiĝon de la homo al la submetiĝo. Ĉio ĉi estas rakontita severe kaj altanime. Sen afekteco. Nu, kia meditado de Hipatia, sur la silenta teraso superanta la urbon ! Ŝi pridemandas sin pri la movo de nia planedo, kvazaŭ metafore por malkovri la sekretojn de la sovaĝeco de la Homoj. Ekde kiam ŝi aperas, en sia rigida tuniko, oni sentas sin koncernata, ne pro perforto, sed pro forto de la atesto, sendepende de la protagonisto, ĉu ŝia patro, Oreste la politika ĉefo, ĉu Davus, la sklavo kiu amas la filozofinon, kaj kiu poste estis liberigita de ŝi. Fakte, temas pri vi, pri ni. Kaj verŝajne ĉar Agora plaĉas sed incitas, tiu filmo estis ignorita en Cannes [kan], ekster sia devena lando Hispanujo, kaj forigita de la kritikistoj. Ĉu denunci la barbarecon de la dogmoj plu estus neelportebla ? Ĉu rememorigi ke la racio superu la kredemon daŭre ŝokas ? Neeblas tion kredi en nia klera jarcento !

Sendube verko por liberpensuloj kaj ties infanoj. Ili aprezos. Sed filmo ankaŭ por tiuj ne emaj al tolero, al humanismo kaj liberpenso.

*Jean Favry*

*El La Raison (Le Mensuel de la Libre Pensée), n° 552, Juin 2010. Retejo web: http://www.fnlp.fr/*

***Elfrancigis Christian Rivière***

Unue proponis tiun tekston Hugo Mora Poltronieri (Kostariko) kiu siaflanke aperigis ĝin hispanlingve ĉe la interesa retejo : http://humanismosecularcr.org

# Je civilizacio aŭ barbareco

**Politeistaj romianoj mortigis en la arenoj kaj krucumis milojn da kristanoj.**

Katolikoj, la posteuloj de la kristanaj martiroj kion faris :

- Edikto de 351 (malpli ol 20 jaroj post kiam ili ŝtatpotencis) : "Ni ordonas mortpunon por tiuj kiuj adoros statuojn."

- ***Krucmilitoj*** (naŭ de 1090 ĝis 1291 : tio estas 195 jaroj) kontraŭ muzulmanoj kaj ortodoksoj (aliaj kristanoj do).

***Krucmilito de la malriĉuloj*** : teruraj amasbuĉadoj de judoj en Centra Eŭropo.

***Preno de Jerusalemo*** (1099) : "En la templo, la ĉevaloj de la (katolikaj) krucistoj tretis ĝis la genuoj en la sango de la muzulmanoj" : viroj, virinoj, infanoj. (Letero de Godefroy de Bouillon , ĉefo de la krucistoj, al la Papo) "Poste, ili rabis en la domoj ĉion kion ili trovis : oron, arĝenton, kaj ĉiujn riĉajojn."(Anonima historio de la unua krucmilito).

- ***Krucmilito kontraù la Kataroj*** (1208)

"La kataraj pastroj estis pli ol 140. Oni ĵetis ilin en la fajron" (Guillaume de Puylaurens).

"Mortigu ĉiujn, Dio rekonos la siajn" (Simon de Montfort )

- ***Inkvizicio*** (1229 1334)

En Eŭropo, kiom da viktimoj, enkarcerigitaj, torturitaj, murditaj, bruligitaj sur la ŝtiparoj en ĉiuj katolikaj landoj ?

En Ameriko, "konvertigo" de milionoj da indiĝenoj per la plej teruraj torturoj kaj masakroj.

"Se la kristanoj mortigis tiom kaj tiom da altkvalitaj homoj, ili faris tion, nur por rabi oron" (1542. Las Casas, katolika pastro).

- ***Sankta Bartolomeo*** (1572)

Miloj da protestantoj buĉitaj eĉ en siaj litoj, laŭ ordono de la tre kristana reĝo Karlo IX.

-Parizo, 1988, katolikaj integristoj incendias la kinejon kiu programis filmon kiu malplaĉis al ili : 13 vunditoj, el kiuj kvar grave.

Ĉiujare la samaj atakas hospitalojn kaj klinikojn kie okazas gravedĉesigoj.

Same kiel la islamaj integristoj ili decidis trudi al ĉiuj, per minacoj kaj atencoj, iliajn proprajn konceptojn .

***Protestantoj***

Agis sammaniere kiam, persekutataj en Francio, ili rifuĝis en Ĝenevo....kaj tuj trudis sian "moralon" al ĉiuj : "Hotelistoj ne rajtas doni nutraĵon kaj trinkaĵon post la naŭa vespere.

"Neniu rajtas danci sub minaco de malliberejo".

(Edikto de Jean Calvin, la 22an de februaro 1539 )

Kaj hodiaŭ, kio videblas en Irlando kie du kristanaj komunumoj malamas kaj atencas unu la alian ? Kial iliaj respektivaj religiaj ĉefoj kaj responsantoj, katolika, la Papo, kaj protestanta ne intervenis, admonestante siajn proprajn paroĥanojn, ĉesigi tiun netolereblan moralan skandalon.

***Hinduistoj***

Dum nur unu jaro (ekzemple 1999) oni nombras multajn sovaĝajn kaj kruelajn atencojn kaj persekutojn kontraŭ kristanoj : murdojn de pastroj, religiulinoj, misiistoj katolikaj aŭ protestantaj,

atakojn kontraŭ preĝejoj aŭ lernejoj en 24 vilaĝoj en nur unu el la 18 ŝtatoj de Hindujo (Guĵarat).

***Muzulmanoj***

Pli kaj pli disvolviĝas en Islamo danĝera integrismo : Islamismo. Antaŭ kelkaj jaroj ĝi regis nur unu landon : Saŭdan Arabion ; hodiaŭ kvar : Iranon, Sudanon, Pakistanon, Afganujon.

En tiuj landoj oni povas konstati, kion povas trudi religio, kiam ĝi estas ĉiopova :

-murdo : ŝtonumado de junulino aŭ virino kies nura peko estis ke ŝi ne surmetis la vualon,

-fortranĉo de mano kaj piedo de ŝtelistoj.

-terura premego de la virinoj, kaj submetigo al la volo kaj potenco de la viroj : patro, frato, edzo, filo, onklo, kuzo... Ĉiuj rajtas mortigi ŝin se ili konsideras ŝin kulpa, laŭ sia persona koncepto de la "moralo" kaj "honoro" : devo de obeo al patro, edzo, ktp, deviga vesto kaj vualo (1), poligamio (2), repudio (3), truditaj geedziĝoj, ktp...

Ĉiuj reguloj pravigitaj per religia leĝaro : la "ŝaria" kaj versiklo (vers) de la sankta libro (Korano) : *.Referencoj : ("suratoj"= "sur"), por (1) sur IV, vers.11, por (2) sur IV, vers.3, por (3) : sur IV vers.15.

## EVIDENTAJ KAJ TIMIGAJ SIMILECOJ

1) BIBLIO : "La viro estas la ĉefo de la virino". Sankta Paŭlo (Epistolo al korintanoj).

2) KORANO : "La viroj estas superaj al la virinoj, ĉar Dio donis al viroj la tutsuperecon sur virinoj".

3) BIBLIO : "Estas laŭ natura ordo ke la virino estas obeema al la viro" (Sankta Aŭgustino).

4) KORANO : "La virinoj devas esti obeemaj. Se la virino malobeas, la edzo rajtas puni ŝin".

5) BIBLIO : "Ĉiu virino devas esti superŝutita de honto je la penso ke ŝi estas virino" (Klemento el Aleksandrio).

6) KORANO : "La edzo rajtas eĉ frapi ŝin. Obeemo protektas la virinojn de perfortaĵoj". (Korano, Surato IV, versiklo 38).

## ......kaj koncernante la herezulojn :

1) BIBLIO : "Se dolĉeco ne sukcesas, estas devo utiligi trudadon." (Sankta Aŭgustino).

2) KORANO : "Batalu kontraŭ tiuj kiuj ne kredas je Dio." (Korano, sur. XIX, vers. 29).

3) BIBLIO : "Oni ne diskutas kun judo, oni plantas sian spadon en lian ventron." (Sankta Ludoviko)

4) KORANO : "Ne alvoku pacon kiam vi estas la plej potenca." (Korano, sur.IX, vers.35)

## KION, ĈEFE, ALPORTAS RELIGIOJ AL NIA MONDO ?

La plimulto de la amasbuĉadoj, servutecoj, torturoj, detruoj de bienoj kaj homaj vivoj, mizeregoj, malsategoj, hatoj kaj genocidoj, militoj havas religion almenaŭ kiel pretekston, se ne kiel rektan kaŭzon.

Kelkaj ekzemploj : (Mallongigoj : muz = muzulmanoj kat = katolikoj ort = ortodoksoj krist = kristanoj).

Kaŝmiro (muz-hinduoj) Timor (muz-kat) Israelo (muz-judoj) Sudano (muz-ort).

Kosovo (muz-ort) Kipro (muz-ort) Ĉeĉenio (muz-ort) Alt-Karabago (muz-kristanoj).

Balkanoj (muz-ort-kat)

Ofte, eĉ, militoj inter adeptoj de similaj religioj :
Kristanaj : Irlando (katolikoj-protestantoj)
Muzulmanaj : Afganujo (ŝiitoj-sunitoj) Alĝerio (muzulmanoj-islamistoj)

## ........kaj tio estas nur kelkaj ekzemploj.

Kiu, konsiderante tiun realecon, kuraĝos aserti ke la religioj alportas pacon, justecon, toleremon, amon kaj feliĉon ?

PS: Budhaismo ŝajnas la sola religio kiu ĉiam proponis kaj aplikis neperforton sed kompaton kaj pacon. Sed tio meritus kontrolon. Pri tio mi petas kunlaboron de la legantoj.

KAJ LA ALIAJ "RELIGIOJ"...

Stalinismo : Kiom da mortintoj en Sovetunio ?... pro kulto de la moŝtulo.

Naziismo : Kiom da mortintoj en Eŭropo ?... pro kulto de la raso.

Liberalismo : Kiom da mortintoj en la mondo ? pro kulto de la profito, de la mono, de la dolaro : milionoj da mortintoj, pro malsato, malsano, mizero, laboro de infanoj, sklaveco, narkotaĵoj, prostituado, potenco de la mafioj, de la diktatoroj, de la supernaciaj firmaoj, kun, kiel neeviteblaj konsekvencoj, mallaboro kaj malriĉeco kiuj puŝas la viktimojn al ĉiuj integrismoj, rasismoj, malamegoj, perfortoj kaj murdoj.

Kiom ofte religio, diktaturo kaj liberalismo kunlaboras, kunfandiĝas, kaj kunagas por krei la mizeron ! Tio estas pli ol evidenta en tiom da landoj :

Pinochet, la buĉisto de Ĉilio estis tre religiema homo kiu regulege ĉeestis diservon.

La petrolriĉegaj muzulmanaj ŝtatoj kie, apud kolosa riĉeco, ekzistas milionoj da mizeruloj submetitaj al la tiraneco de la religiuloj kaj de la polico.

En la plej potenca lando de la mondo, Usono, kvankam kovrita de la demokratia kostumo, la situacio ne estas tiom malsimila : en la manoj de kelkaj homoj, neimageblaj amasoj da riĉaĵoj kaj potenco, kaj milionoj da mizeruloj. La tuto, sub la ŝildo de Dio.

"Dio protektu Usonon ! "proklamis G.Bush". Kaj, je la nomo de Dio, li trudis mortopunon, kontraŭpersonajn minojn, frenezan ekspluatadon de la mondo kaj de ĝiaj loĝantoj, kaj polucion de nia planedo.


Duonjarcenton antaŭe, kion gravuris Hitlero sur la zonobukoj de la germanaj soldatoj : "Gott mit uns" ("Dio kun ni").

Kiam oni scias, kio okazis al la mondo kun Dio je la servo de Hitlero, oni rajtas timi, kio okazos kun Dio je la servo de homoj kiaj Bush.

***Jean MARIN***

Pli ol 5000 Bulgaroj defiladis, hieraŭ en Sofia, post alvoko de la ortodoksa eklezio por postuli religian edukadon en la lernejoj. La manifestaciantoj portis panelojn kun la sloganoj "Sufiĉas 66 jaroj da ateismo", "Popolo sen moraleco estas kondamnita".

*Komunikis Jackie Huberdeau (Francujo) el la sabata taggazeto Maine libre (la 25an de septembro 2010).*





Redaktas: Jesuo de las Heras.
Korektas: Christian Rivière,
christian.riviere@laposte.fr.
Retskribu al:
liberpenso@gmail.com

*Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe, ke oni citu la originon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj responsas ties aŭtoroj, ne la redakcio. Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj, kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo*

# Enhavo

**Parolas la prezidanto.......2**
**Administra kunveno........3**
**Letero al Prezidanto de Bolivio..............................3**
**La celo de la vivo...........4**
**Agora...............................12**
**Je civilizacio aŭ barbareco.......................13**



*Kovrilo: Kelkaj samidea-noj dum la kunveno de ATEO dum UK95.*
*Jarkotizo: €15.*
*Konto ateo-y ĉe UEA*